nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2015

## FORPASIS DARÍO

La pasintan 14-an de oktobro forpasis en Madrido nia amiko, unu el la plej veteranaj membroj de Madrida Esperanto-Liceo, Darío Rodríguez López de Silva. Kvankam 84-jara (li naskiĝis en aŭgusto 1931), li estis tre agema ĝis antaŭ kelkaj semajnoj, kiam li devis esti enhospitaligita. Eĉ se komence aspektis ke la malsano estis zorgiga sed ne danĝera, en la lastaj tagoj lia sanstato subite malpliboniĝis kaj li forpasis en la mateno de tiu tago.

Darío lernis Esperanton tre juna, kaj komencis aktivi en la madridaj esperantistaj rondoj kiuj iom post iom ekvekiĝis post la enlanda milito. Laŭ la verko *"Historia del esperanto en Madrid"*, de Lupe Sanz, jam en 1952 li gvidis kursojn de Esperanto kaj en 1953 ni renkontas lin en la estraro de Madrida E-Klubo kune kun generalo Perogordo.



En 1954 li estis nomumita voĉdonanto de la estraro de HEF prezidita de doktoro Herrero, nome de la madridaj esperantistoj. Tie li estis respondeculo pri la servo pri gazetaro kaj radio. Li estis aktiva en la disvastigo de nia lingvo en amaskomunikiloj kaj eĉ gvidis programon pri Esperanto en la radio.

Li ankaŭ estis sekretario de la Organiza Komitato de la 18-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en Madrido en julio 1957.

En la 60-aj kaj 70-aj lia agado tre malpliiĝis, ĉefe pro personaj kaŭzoj, kaj tiun periodon li poste nomis (iom troige) sia kabeiĝo.

Tamen, post sia emeritiĝo li revenis al la movado kun granda forto. Malgraŭ sia aĝo li tre bone regis la retajn ilojn, kaj dediĉis sian aktivadon ĝuste al la partopreno en la unuaj retaj forumoj kaj al la interŝanĝo de novaĵoj de iuj partoj de la movado al la aliaj, super la landlimoj. Tiel, li fariĝis tre konata en internaciaj medioj, kiel atestas la fakto ke el ĉiuj partoj de la mondo venis montroj de kondolencoj kiam oni ekkonis lian forpason. Ĉiuj reagoj substrekas lian afablecon kaj helpemon, kaj tia li restos en ĉies memoro.

Li estis enterigata en la tombejo La Almudena. Funebra meso por li okazis la ĵaŭdon 29an de oktobro, en la preĝejo Cristo de la Victoria, tre proksima al nia sidejo.

## MEL KUNVOKAS VIN POR KOMUNA TEATRA LEGADO

La Madrida Esperanto-Liceo proponas al vi komunan legadon de teatraĵo. Temas pri teatra legado; do, kvankam ni ne vere aktoros sur scenejo, ja ni legos (ĉiu sian rolulon) per la ĝusta modulado, laŭ la ago iras.

Kiam: Unuafoje, lundon la dua de novembro, je la 19:00, kvankam konvenas alveni iom antaŭe por pretiĝi. Kaj ne iom poste, por ne ĝeni al preskaŭ-aktoroj.

Kio: Ni pretigos tri teatraĵetojn, komedietojn verkitaj far Marjorie Boulton, sufiĉe mallongajn. Do, ni povos kunlegi unu aŭ pli, laŭ nia bontrovo. Tio dependas ankaŭ de la nombro de partoprenantoj: la tri pecoj bezonas naŭ, sep kaj kvin rolulistojn.

Kiuj: Nu, ni vidos. Se la partoprenantoj svarmas, kelkaj el ni nur spektos; se la nombro ne sufiĉas eble unu homo legos du rolojn. Ĉu oni bezonas teatran sperton? Tute ne, temas nur pri laŭte legi, provante sekvi la sentojn el la roluloj.

Kial: Unue por distri nin, due por amuzi nin. Sed eble temas pri bona sperto por tiuj kiuj ankoraŭ lernas la lingvon, ĉar nepras ne nur diri, sed ankaŭ voĉe esprimi.

Kie: Ĉe la HEF-a sidejo: strato Rodríguez San Pedro, 13 – 3ª etaĝo, 7ª pordo.

Ion pli: Memoru, ni havas fridujon kun zamenhofaj bieroj, kiujn vi povas aĉeti kaj trinki surloke, do vi povas alporti ion manĝeblan, kaze ke vi ne devas roluli.

## DANCOSPEKTAKLO KUN ESPERANTO



Nia almeria samideano Indalecio Seura partoprenas dum tiuj ĉi pasintaj tagoj en spektaklo de danco kaj teatro titolita *"Beautiful Beach"*, en la teatrejo LaZonaKubik, en kvartalo Usera. En ĝi montriĝas varieco de stiloj kaj proponoj, interalie oni parte kantas en Esperanto.

La spektaklo daŭras en Madrido nur ĝis la 1-a de novembro.

## MADRIDANOJ EN RENKONTOJ DE ESPERANTO

Dum la monato oktobro tri renkontoj de Esperanto disvolviĝis en nia duoninsulo, kaj en ĉiuj tri partoprenis madridanoj.

Komence de la monato la Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo alvenis al sia 23-a jaro, en la urbo Roses (provinco Ĝirono). En la semajnfino de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro pluraj madridanoj partoprenas la 19-an Andaluzan Kongreson de Esperanto, en Jerez de la Frontera (provinco Kadizo). Kaj en tiu sama semajfino, la 37-a Kataluna Kongreso de Esperanto estis okazigita en Mataró (provinco Barcelono), kun Jorge Camacho kiel unu el la partoprenantoj en la kultura programo.

Dume, plu daŭras la pretigado de la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos inter la 30 de junio kaj 4 de julio 2016 en Herrera del Duque (Ekstremaduro). La ĉefa ekskurso havos kiel celon la monaĥejon de Guadalupo. Detalojn kaj aliĝojn, en la retejo http://www.esperanto.es/kongreso. Pliajn informojn eblas peti al kongreso@esperanto.es.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

En la momento de fermo de tiu ĉi bulteno oni ankoraŭ ne decidis la detalojn de la sabata babilado. Ĝi okazos la 7-an de novembro, sed atentu la forumojn por koni lokon kaj horon.

Por esti informitaj pri la novaĵoj de la movado en Madrido kaj aliloke, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel kaj la retan diskutliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com